

D E K L A R A C I O

SAT KONGRESO

ST. PETERBURGO

Deklaracio

La 69-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazinta de la 13-a ĝis la 20-a de Julio 1996 en Sankta Peterburgo, en kiu partoprenis 240 reprezentantoj :

- Konstatas: ke ĉie en la mondo okazas atakoj kontraŭ la vivo kaj la vivkondiĉoj de la laboristaro. Kreskas malegaleco inter la diversaj sociaj tavoloj. Pligrandiĝas senlaboro, ekskludado kaj mizero en preskaŭ ĉiuj landoj. Plue daŭras detruado de ĉirkaŭaj riĉaĵoj.
- Internaciaj instancoj, kiel IMF kaj transnaciaj firmaoj draste trudas al popoloj troliberan kapitalismon, dum la amaskomunikiloj disvastigas individuismojn kaj malsolidarecon.
- La ekonomiaj politikoj aplikataj kondukas al sistema malmuntiĝo de la sociaj rajtoj kaj de la publikaj servoj.
- Ĝi atentigas, ke la koncepto pri etna purigado estas instigo al krimo kaj per si mem atenco kontraŭ la homaro.
- Ĝi aparte komdamnas tiujn, kiuj deziras uzi perforton kontraŭ homoj kaj militoj kontraŭ popoloj aŭ etnoj.
- Ĝi alvokas al justa paco en Palestino, Ĉeĉenio (Iĉerio), Norda Irlando, ktp.
- Ĝi komdamnas ekonomiajn embargojn kontraŭ Kubo, Irako kaj aliaj landoj.
- Ĝi firme apogas la kampanjon de Amnestio Internacia kontraŭ turmento kaj mortpuno.
- Ĝi opinias, ke militkrimuloj el Eks-Jugoslavio, Ruando kaj Ĉeĉenio devas esti juĝataj, en kiu ajn tendaro ili estis.
- Ĝi esprimiĝas kontraŭ ĉiuj dogmoj kaj fanatikismoj filozofiaj, politikaj aŭ religiaj kaj emfazas la rolojn de racio, toleremo kaj interdiskuto.
- Ĝi invitas ĉiujn laboristojn, verajn demokratojn, maldekstrulojn tra la mondo:
- Konsciiĝi, ke plue daŭras ekspluatado kaj pripensi la novajn formojn de sociaj bataloj.
- Kontraŭstari ĉiujn naciismajn, rasismajn kaj ŝovinismajn fortojn.
- Atentigi pri la rolo, kiun Esperanto ludas, ne nur por faciligi la internaciajn kontaktojn en la batalo por pli justa sociordo, sed ankaŭ por superi la barilojn de naciaj antaŭjuĝoj inter diversnaciaj homoj.
- Alvoki al kunlaboro kun laboristaj Esperanto-grupoj kaj organizoj por tiuj celoj kaj pe-tas specialan subtenon por la taskoj de Sennacieca Asocio Tutmonda.